**[uea-membroj] EKOO 7 Neergaard**
1 mensagem

**Stefan MacGill via groups.io** <stefan.macgill=gmail.com@groups.io> 19 de março de 2026 às 04:19
Responder a: uea-membroj@groups.io
Para: listo 'nova uea-membroj' <uea-membroj@groups.io>

# EKO 7

## Scienca lernejo memore al Neergaard

La 19-an de februaro la Scienca Lerneja Kalendaro 2026 kreita de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) omaĝas la scienciston kaj esperantiston Paul Neergaard, patro de empatologio: [**https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Neergaard**](**https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Neergaard**) .
Vi povas elŝuti la tutan Sciencan Kalendaron el la retejo de CSIC, kun aliaj komplementaj materialoj ĉe: **https://digital.csic.es/handle/10261/411155**

## Pioniro de ILEI forlasis nin

La 8an de marto 2026 forpasis Radojica Petrović (Радојица Петровић, 1949-2026), serba matematikisto, komputisto, instruisto kaj esperantisto; Esperanto-instruisto kaj movad-organizanto, estrarano (2001-26) kaj prezidanto (2003-09) de ILEI, organizinto de pluraj konferencoj kaj kongresoj de ILEI kaj de porinstruistaj seminarioj, prezidanto de Serbia Esperanto-Ligo, komitatano A de UEA (1996-2007).

Ni funebras pro lia forpaso kaj kondolencas liajn familianojn kaj amikojn.

## Statu de Graco (Grez)

Je la 1a de marto al la 111a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026 en Graco (Graz, Aŭstrio) aliĝis 757 personoj el 56 landoj, plej multe el Germanio (106), Pollando (75) kaj Francio (70). Legu pli detale en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto”

https://sezonoj.ru/2026/03/graco-13/

## Brazila sonoro

Parolis Ursula Grattapaglia de Brazilo pri sia longa vivo en Esperantujo en la serio "Mia vivo en, kaj ekster, Esperantujo". Gian Carlo Fighiera prezentis ŝin. Detaloj ĉe Eventoservo:

https://eventaservo.org/e/b6e235

**Sendis: Dennis Keefe**

## Esperanto en la hungara nacia novaĵagentejo

En la retpaĝoj de la hungara nacia novaĵagentejo "MTI" aperis nia komuniko pri la rememorado kaj florkronado ĉe la memortabulo de d-ro Kalocsay Kálmán. La servon de la agentejo abonas ĉ. dumil entoj, inter ili redakcioj de multaj paperaj kaj elektronikaj amaskomunikiloj.

## Ret-radio jam maturiĝis

Jam de 15 jaroj Esperanto-Retradio kreas en ĈIU TAGO 3-6 minutajn mallongajn sonmaterialojn por helpi la ekzercadon de la parolata lingvo. Oni povas ne nur aŭdi lingve korektajn Esperantajn tekstojn, sed oni povas samtempe vidi ankaŭ ilian tekston sur la ekrano. La sonmaterialoj estas tre utilaj kaj por komencantoj kaj por meznivelaj esperantistoj.

## Brazila paasko kaj pluvo

ᴛiu ĉi estas kanto de la bando **Falamansa**, nome Ho pluvo (originale *Oh! Chuva*). La muzikstilo, tipa el nordoriento de Brazilo. Intertempe jam 46 homoj aliĝis al la paska renkontiĝo PRINTEMPE, komence de aprilo, https://esperanto.land/printempe/partoprenantoj_printempe6.php

Stefan MacGill

Respondecoj en UEA: Landa Agado, AMO, EKO, Canuto.
Respondecoj en ILEI: Loka kaj landa agado, Juna amiko.


_._,_._,_

---

Groups.io Links:

You receive all messages sent to this group.

View/Reply Online (#7007) | Reply to Group | Reply to Sender | Mute This Topic | New Topic

---

La konversacioj en ĉi tiu listo estas privataj por la komunumo. Bonvolu ne afiŝi retpoŝtojn en vian blogon aŭ plusendi ilin, krom se vi certas, ke ĝi estas en ordo ĉe la verkisto.

: uea-membroj+unsubscribe@groups.io

Your Subscription | Contact Group Owner | Unsubscribe [paulo.pires@flugfolio.xyz]

_._,_._,_